

# Pro la Krist-naskiĝo

## GDY SIĘ CHRYSZTUS RODZI • ADORU 210

1. Pro la Krist - nas - ki - ĝo  
ce - das nokt' mal - he - la,  
ga - jas tu - ta mon - do,  
bri - las lum - a - bun - do,  
kan - tas — ĥo - roj de l' an - ĝe - loj,  
ĝo - je — e - ĥas tra ĉi - e - loj:

*refreno:*

Glo - ri - a, glo - ri - a, glo - ri - a  
in ex - cel - sis De - o.

2. Aŭdas paŝtistaro,  
kiu gardas gregon:  
Oni Betleĥemon  
faru nun kuregon;  
|: ĉar naskiĝis Di-Savanto.  
Indas Li je ĉies kanto. Gloria ... :|

3. Kiam greg-gardistoj  
tion ĉi komprenis,  
Betleĥemon ili  
rapideme venis,  
|: kaj renkontis stalan helon,  
obeante la anĝelon. Gloria ... :|

4. Ili staris longe  
plenaj de stuporo,  
ke sin humiligis  
la Ĉiel-Sinjoro.  
|: Poste ĉiuj sin omaĝe  
ĵetis teren sur-vizaĝe. Gloria ... :|

GDY SIĘ CHRYSZTUS RODZI • EG 53 • Thuma Mina 267 • ŚK 39\* •  
Kristnaskaj Kantoj, p. 27 • EM 183 • M kaj pola T: ĉe Michał Marcin  
Mioduszewski, Kraków 1838-1853 • E: el Hodiaŭ ni preĝas, Henryk Paruzel,  
prilaborita de Jan Kos, prilaboro: Kloster Kirchberg 1997/2000 • 2001 en  
ADORU 210

↑ Luk 2,11

*La ripetado de la dua duono estas fakultativa.*

<https://www.youtube.com/watch?v=K7qGauu3Eyg>  
(2020-12-12)